

# BOAGO



ELDONO DE ĆS. MEM-SEKCIO  
1981

## FONTO DE LA PROGRESO

Tiu ĉi jaro en Ĉeĥoslovakio abundas je kelkaj eventoj gravaj laŭ la vidpunktoj ekonomia kaj politika. En aprilo okazis la XVI-a Kongreso de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, kiu starigis programon de la plua antaŭenigo de la lando. En junio okazas la ĝeneralaj elektoj kaj preskaŭ samtempe oni memorigas la 60an datrevenon de la fondiĝo de KPĈ.

Kaj jam ekde januaro ĉijara komencis efektiviĝi la sepa kvinjarplano de la nacia ekonomio. Tiurilate la plej aktuala kaj ĉefa celo estas atingi esencan plibonigon de la kvalito kaj efektiveco de la tutsocia laboro, helpe de la pli pretenda direktado kaj organizado. Kiel asertas la vortoj de malnova laborista kanto laboro estas fonto de la progreso. Sen ĝia plibonigo ne eblas sukcesi en la internacia konkurado kaj laŭeble plialtigi la vivnivelon de la civitanaro.




FOTO MILAN LABAŠTA

En la internacia vivo Ĉeĥoslovakio daŭre akcentas sian pretecon ligi kaj konservi bonajn kontaktojn kaj reciproke avantaĝan kunlaboron kun la ŝtatoj de la malsana sociordo. Nature, la ĉefa atento enfokusiĝas al la problemo de la malstreĉiĝo de la politika

tensio en Eŭropo, tamen ne malpli decide estas subtenataj klopodoj plifirmigi la pacan kunekzistadon kaj sekurecon en ĉiuj aliaj landoj, en la tuta mondo. Tio estas plej grava kondiĉo por la homa agado, por la homara progreso.

## RADIKOJ DE LA ESTONTO...

**tiel oni povus parafrazi la eventon antaŭ sesdek jaroj, kiam fondiĝis la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, klopodanta starigi la novan kaj justan socian ordon, partio, kiu en 1948 perbatalis definitive potencon kaj komencis estri efektivigon de la socialisma socia ordo enlande.**

Estiĝo de KP de Ĉeĥoslovakio okazis en komplikaj internaciaj kaj internaj kondiĉoj de la nova ŝtato — Ĉeĥoslovaka Respubliko, en la kondiĉoj, kiam okazis ideologia disdivido en la plej granda kaj influa politika partio — socialdemokratia — kaj la laboristaro komencis pli kaj pli inklini al revolucia solvo de la socialaj problemoj.

La maldekstraj reprezentantoj de la socialdemokratio tiam sukcesis gajni apogon inter la laboristaro kaj en la intelektulaj rondoj. Fine de 1919 ili jam konferencas kiel aparta politika forto kaj aliĝas al la principoj de la proleta diktaturo. Grave stimulis tiun ĉi paŝon la II-a Kongreso de Komunista Internacio, kiu starigis la „21 kondiĉojn“ por la revoluciaj partioj; ilia esenco estis ĉefe definitiva rompo kun la reformistoj, batalado por la proleta diktaturo, akcepto de la nomo Komunista Partio kaj aplikado de la bolŝevista taktiko. Tiuj ĉi ideoj rapide reeĥis inter la junularo — la junaj socialistoj en Slovakio dum sia kongreso en septembro 1920 decidis membriĝi al Komunista Internacio. En la sama monato delegitoj de la XII-a Kongreso de Ĉeĥoslovaka Socialdemokratia Partio konsentis kun la pricipoj de KI.

Iom alia situacio estis en la germana socialdemokratia partio en ĈSR, kie la maldekstruloj ankoraŭ ne sukcesis gajni la plejparton de la delegitoj partoprenintaj la partian kongreson en Karlovy Vary.

\* \* \*

La maldekstraj socialistoj en Ĉeĥoslovakio postulas de la registaro, ke ĝi realigu sian planon pri la socialistigo de la produktad-rimedo. Politika konflikto inter la revoluciuloj kaj reformistoj kulminas en decembro 1920, kiam la polico okupas sidejon de la maldekstra socialdemokratia — Popolan Domo en Prago — kaj konfiskas presejon de la

gazeto Rudé právo. La defendantoj — multaj laboristoj el pragaj uzinoj — estis venkitaj.

Responde al tiu ĉi registara persekutado eksplodis ĝenerala striko, kiun partoprenas centmiloj da laboristoj en industriaj urboj de la tuta ŝtato. Multloke oni fondas revoluciajn komitatojn, elproprigas fabrikojn kaj grandbienojn. Pli ol 3000 strikantoj estis arestitaj, kiam la registaro reprenis la potencon.

La malvenko plifirmigis ĉe la proletaro seniluziigon pro la reformista socialismo kaj samtempe konsciigis al ĝi la nepran bezonon konstrui konsekvence revolucion politikan partion. Tion manifestis kongreso de la maldekstraj marksismaj organizoj de ĉiuj naciecoj el Slovakio kaj Transkarpatio en Lubochňa, januaron 1921, kiu unuanime akceptis la menciitajn kondiĉojn de Komunista Internacio. La saman paŝon entreprenis ankaŭ la maldekstraj germanaj socialdemokratoj.

\* \* \*

Tiu ĉi transformiĝa procezo kulminis laŭ organiza vidpunkto dum la fonda kongreso de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio en Prago, en la tagoj 14—16a de majo 1921. Partia gvidanto Bohumír Šmeral akcentis kiel ĉefan taskon plifortigi la partion, disvastigi ĝian influon inter la proletaro kaj popolamasoj. Batalante por la konkretaj postuloj de laboruloj oni devas konstrui fronton kontraŭ la granda kapitalo kaj tiel prepari la grundon por konkero de la politika potenco kaj starigo de la registaro de laboristoj kaj kamparanoj.

En novembro 1921 unueciĝis kun Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, laŭ la principoj de la marks-leninismo, Germana fako de KPĈ, Pola Komunista Partio kaj Juda komunista grupo. Laŭ sia membraro KPĈ apartenis tiutempe al la plej grandnombraj sekcioj de Komunista Internacio.

\* \* \*

Problemo pri starigo de laborista registaro reaktualiĝis en la jaroj 1921—1922, kiam enlande kreskis ĝenerala mal-kontento pro la ekonomia krizo kaj senlaboreco. Pri tiu

ĉi situacio okupiĝis la I-a Kongreso de KPC (1923). Ĝi prezentis ankaŭ la unuan programon de la partio pri la nacieca problemo. Koncernaj tezoj rifuzas politikon de la nacia opreso fare de la ĉeĥa burĝaro kaj samtempe separatismajn tendencojn en la naciaj minoritatoj. La kongreso akcentis, ke la komunistoj batalas kontraŭ ĉiuj manifestigoj de la nacieca malegaleco, kontraŭ la nacieca kaj sociala subpremadoj. KPC defendis la principon de la nacia memdestino, tamen ĝi ankoraŭ ne scipovis rekoni la rajton de la slovaka nacio pri la memstariĝo kaj superi la tiaman koncepton pri la „ĉeĥoslovaka“ nacio — kvankam tiu ĉi koncepto laŭ la komunistoj respegulis prefere ilian konscion pri la kunaparteniĝo de ambaŭ popoloj.

\* \* \*

La juna partio — kaj tio estis unu el ties gravaj mankoj — ne komprenis la revolucion signifon de la laborantaj kamparanoj — la plej proksimaj aliancanoj de la proletaro. La slogano pri la laborista registaro estis grava malgraŭ tio, ke la revolucia krizo ankoraŭ ne estis tiom profunda por povi realigi ĉi sloganon.

En tiu ĉi periodo KPC ankoraŭ ne sukcesis serioze endanĝerigi la burĝan sistemon, kiu tiutempe jam stabiligis en Ĉeĥoslovakio kaj en aliaj landoj. Tion konstatis la V-a Kongreso de Komunista Internacio kaj ĝi starigis kiel ĉefan taskon altigi ideologian kaj politikan nivelon de la komunista movado kaj bolŝevistigi la sekciojn de KI.

\* \* \*

Interne de KPC okazis diskutado pri la rezultoj de tiu ĉi kongreso. Tiam elformiĝis la oportunisma tendenco erare konsideranta stabiligon de la kapitalisma sistemo firma kaj daŭra — kaj per tio perdanta la perspektivon de sociala revolucio.

La revolucion maldekstran tendencon reprezentis precipe la anoj de la juna generacio. Apartan pozicion okupis la tiamaj plej signifaj proparolantoj de la partio — B. Šmeral, A. Zápotocký k. a., kiuj la sloganon pri bolŝevistigo akceptis, subtaksante gravecon de la danĝero eldekstre.

Post la II-an Kongreso de KPC (1924), kiu plene aprobis la direktivojn de la V-a Kongreso de KI, en la partio okupis gvidan pozicion la maldekstra opozicio, gvidata de J. Haken, anstataŭ la ĝistiam estraro sub B. Šmeral.

En la rezolucio pri la nacieca problemo oni unuafoje starigis la sloganon pri la rajto je memdestino ĝis separiĝo.

\* \* \*

Kreskantan prestiĝon de la partio en la socio konfirmis en 1925 parlamentaj elektoj, en kiuj KPC ricevis 924 000 voĉojn kaj sekve fariĝis la dua plej forta politika partio. Ĝi kontraŭbatalas la agrarajn impostojn, kiuj kontribuas al plikostigo de agrikulturaj produktoj, sed la registaro vanigas ties reziston kaj ekigas kontraŭ KPC kampanjon, en kiu estas arestitaj kvar komunistaj deputitoj kaj la registara gazetaro pledas por malpermeso de la partio.

En la jaroj 1927—1928 denove impetas en Ĉeĥoslovakio strikoj kaj rezisto kontraŭ malfavoraj efikoj de la industria raciigo. Tamen, nek la partio nek la Ruĝaj sindikatoj sukcesis profiti de tio pro la oportunismo reganta en ili. La krizo kulminis dum la okazigo de la protesta partia kampanjo kontraŭ malpermeso de la II-a Spartakiado. Tiu ĉi protesta aranĝo, planita spite al obstaklo de aŭtoritatoj, fiaskis, kaj elvokis akran konflikton inter la dekstra kaj maldekstra tendencoj en la centra komitato de KPC.

\* \* \*

La mejloŝtono fariĝis la V-an Kongreso de KPC. Proparolanto de la maldekstra tendenco Klement Gottwald en sia referaĵo ĝuste antaŭvidis kolapson de la kapitalisma stabiliĝo kaj la revolucion reaktiviĝon. La kongreso evidentigis kreskantan danĝeron de la faŝismo kaj ellatentigis la taskon unuigi laboristojn kaj kamparanojn en ilia batalo kontraŭ la kapitalismo.

Kiel precipan taskon interne de la partio ĝi indikis definitivan likvidon de la socialdemokratiaj tradicioj, tiu ĉi konstanta kaŭzo de la oportunismo kaj pasiveco. Batalon kontraŭ la oportunistoj oni daŭrigis per purigo de la Internacia Tutsindikata Asocio.

Malvenkigo de la oportunismo estas la ĉefa merito kaj historia signifo de la V-a Kongreso. La nova partia estraro estis elektita plejparte el junaj funkciuloj, neŝarĝitaj de la socialdemokratiaj tradicioj. La kongresa linio ĝuste antaŭvidis disfalon de la kapitalisma stabiliĝo kaj pliakriĝon de la klasbataloj. Ĝi preparis la partion por estra rolo en imponaj ekonomiaj kaj politikaj bataloj de la sekvontaj jaroj.

(er)

En la lastjara raporto de la Federacia Statistika Oficejo de ĈSSR pri la evoluo de la nacia ekonomio kaj pri la plenumado de la ŝtata plano en 1980 oni povas legi i. a. jenajn faktojn:

- Nacia enspezo kreskis kompare kun la jaro 1979 je 3 %, industria produktado je 3,2 % kaj agrikultura produktado je 6 %

- Spezo de la eksterlanda komerco estis je 11 % pli alta ol en 1979; ne estis plenumitaj eksportaj taskoj rilate maŝinindustriajn produktojn

## 1981 LAŬ NOMBROJ

- En karbominado estis ekspluatitaj 123,1 mil tunoj da karbo kaj lignito — je 1,2 % malpli ol en 1979

- En la nacia ekonomio laboris 7 340 000 personoj, je 0,8 % pli ol en 1979. Meza monata salajro de laboruloj

(sen tiuj en agrikulturaj kooperativoj) altiĝis je 2,4 % (2640 kronoj estas la meza salaroj.)

- Oni finkonstruis 127,8 mil loĝejojn; la plano estis plenumita nur je 97,9 %. Individue konstruitaj loĝejoj konsistigas 32,3 mil de la suma kvanto.

- Nombro de telefonaparatoj kreskis je 78 mil; la 31. 12. 1980 da ili estis instalitaj 3 150 mil (ĈSSR havas 15 milionojn da loĝantoj)

- Geedziĝis 119 mil kaj eksedziĝis 33 mil paroj. Naskiĝis 247 mil vivantaj infanoj.




FOTO MILAN LABAŠTA

# SUR LA DU FRONTOJ

## ĈEĤOSLOVAKAJ ESPERANTISTOJ KAJ REVOLUCIA MOVADO

En la sama jaro, kiam fondiĝis Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, oni metis la fundamentan ŝtonon de la unua internacia laborista Esperanto-organizo kun klasbatalaj principoj. Kadre de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Prago, 1921, estiĝis Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kies agado formas gravan ĉapitron en la evoluo de la proleta esperantismo.

Al la revolucia movado de la esperantistoj en Ĉeĥoslovakio estas dediĉita verketo, kiun kompilis J. Klement, D. Kočvara kaj M. Turková kaj kiu aperos kiel ekstra aldono de la ĉeĥoslovaka Paco. Ĝia titolo — Sur la du frontoj — reliefigas la fakton, ke la batalo por la liberigo de la laborista klaso kaj tiu por la reciproka kompreniĝo de la popoloj estas nedisigeble ligitaj ekde la komenco de la laborista movado.

Ni eksikas, ke jam la 10-a kongreso de la Bohem-slava Social-demokratia Partio (1911) „unuanime rekomendis la propagandon pri Esperanto inter la bohemiaj laboristoj“ — tiam ankaŭ fondiĝis Laborista Asocio Esperantista, sekcio de Laborista Akademio en Prago. Inter 1912—1914 aperadis la asocia monata gazeto „Kulturo“, kiu respeguligis la revolucion starpunkton de LAE. „Nia unua celo do estas eluzo de Esperanto en servoj de internacia socialismo“ ni legas en la unua numero.

Post la 1-a mondmilito fondiĝis (1918) „Asocio de laboristaj esperantistoj“ en Prago, kiu daŭris ĝis 1932, bedaŭrinde la dokumentoj pri ĝia ekzistado restis nekonataj.

Influita de Oktobra Revolucio en Ruslando la ĉeĥa proletaro komencas diferencigi laŭklase. Tio manifestiĝis ankaŭ en la Esperanto-movado. Kontraŭ la ĝistiam „neŭtrala“ esperantismo SAT, fondita en la jaro 1921, proklamas la devizon utiligi la Internacian Lingvon por la klasaj celoj de la tutmonda laboristaro. Ankaŭ ties gazetoj — „Sennaciulo“, „Nova epoko“ kaj pli poste la „Sennacieca Revuo“ publikigas artikolojn pri la klasbatalo, pri la unua socialisma ŝtato — USSR — analizojn pri la laborista vivo en diversaj landoj. Gazetara servo de SAT peradas informojn pri la batalo kaj vivkondiĉoj de la laboristaro al la nacilingvaj laboristaj ĵurnaloj kaj gazetoj.

Du ĉelimaj renkontiĝoj de la laboristaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio manifestis la proletan internaciismon en la praktiko — unu el ili okazis en Rybáře apud Karlovy Vary (1925), la alia en Nejdeč, en la sama regiono.

Kontraste al utopia „sennacieca“ teorio prezentata en SAT fare de ĝia

gvidanto E. Lanti — kies starpunkto montriĝis kontraŭrevolucia kaj kontraŭsovetia — leviĝis la marks-leninisma opozicio. En Berlino estis fondita (1932) Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE), kiu ekbatalis kontraŭ la minacanta faŝismo kaj milito, defendante la socialismon en Sovetio. IPE stimulis Proletan Esperanto-Korespondadon (PEK), per kiu ĝi sukcesis superi neŭtralismajn tendencojn kaj speciale meritis pri la ĝusta informado ankaŭ al la neesperantista publiko pri Sovetio.

En Ĉeĥoslovakio ambaŭ Esperanto-movadoj — neŭtrala kaj laborista — estis tiutempe dividitaj laŭ naciecoj (ĉeĥa kaj germana). Tamen klaskonscio kaj la senpera danĝero de la faŝismo motivis ilian kunlaboron kaj alproksimigis certgrade unu la alian laŭ la ideo de la „popola fronto“. La proletaj esperantistoj en ĈSR esprimis internaciismon helpante per monkollektado k. a. la hispanajn respublikanojn.

En la rezist-rondoj kontraŭ la diktaturo de Hitler ne unufoje okazis, ke la komunistaj kaj socialdemokrataj esperantistoj trovis la komunan starpunkton. Tion pruvas unu el radioelsendoj de la gestapo: „La 10an de februaro 1934 sabate okazos en Karlovy Vary la Esperanto-kongreso organizota fare de la komunistaj kaj socialdemokrataj partioj. Ni havas garantiitajn informojn, ke oni klopodas konduki trans la limon ankaŭ delegitojn el Germana Regno. Laŭ la sciigo de la fidinda persono ili estas transportotaj, revenante al Saksujo — provokan propagand-materialon. Ni postulas vigan kaj severan observadon...“

Post la okupo de la ĉeĥoslovaka limteritorio en 1938 la nazioj unue malpermesis agadon de la tiea Germana Esperanto-Ligo. Ĉeĥa Asocio Esperantista rajtis agadi nur inter la ĉeĥoj, sed en 1940 ankaŭ ĝi estis likvidita kaj ĝiaj reprezentantoj murditaj aŭ arestitaj.

La revoluciajn tradiciojn de la laborista kaj kontraŭfaŝista esp. movado daŭrigis post la milito — kiel evidente — Mondpaca Esperantista Movado (MEM), kies spirita patro estis ĉeĥoslovaka komunisto R. Burda. MEM klopodas plifaciligi la rilatojn de la pacmovadoj per komuna internacia lingvo samtempe aktive partoprenante en ili. Tiamaniere ĝi ne nur pligrandigas la aŭtoritaton de IL en la pacmovado, sed montras la vojon ankaŭ al aliaj organizoj suferantaj pro multlingveco. Porpaca agado fariĝis do nature konsista parto de la funkciado de la Esperantomovado en la socialismaj ŝtatoj.

(al)



## KLOSTRO ŜANĜITA JE GALERIO

En la praga cisterciana klostro, nomita laŭ ties kunfondintino kaj abatino Agneso (1208 aŭ 1211—1282), filino de la ĉeĥa reĝo Přemysl Otakar I. finiĝis pasintjare la unua etapo de la longa kaj ampleksa renovigo. La adaptita interno servos kiel ekspoziciejo por la artaj kolektoj de Ĉeĥa Nacia Galerio.

La tuta konstruaĵo estas valora precipe pro siaj arkitekturaj ecoj kaŭzitaĵoj de komplika kaj interesa historia evoluo kaj de diversaj influoj eksterlandaj.

La klostro, kies kompletigado kaj modernigado kulminis en la 14-a jarcento, estis en la jaro 1782 malestablita kaj dum kelka tempo ĝi servis kiel rifuĝejo por mizeruloj. En 1882 la praga urbestro decidis pri ĝia ruinigo; la motivo estis plorinda aspekto de la konstruaĵo.

Realigon de tiu ĉi bedaŭrinda decido malhelpis klopodoj de la histori-ŝatantoj kaj de la viena Centra Komisiono por protekto de la monumentoj. Konstrulaboroj por renovigi la dezertitan monaĥejon startis en 1893 kaj daŭris ĝis la fino de la unua mondmilito, post kiam sekvis dudekjara paŭzo.

Oni rekomencis la laborojn kaj ankaŭ laŭsisteman arkeologian esploron post 1945. Komence de la sesdekaj jaroj sekvis decido, ke la memorindaĵoj oni utiligos unuavice kiel ekspoziciejon por instali tie artaĵojn de la 19a jarcento.

Preskaŭ post centjaraj klopodoj la klostro servas hodiaŭ al la publiko. En la unua etapo estis renovigita gotika domo, baroka korto kaj renesanca ĝardeno. En la dua etapo sekvos restarigo de la preĝejoj kaj kapeloj kaj ilia adapto por la kulturaj aranĝoj.

(r)

## PETER JILEMNICKÝ

Kiam Pavel Huščava foriris antaŭ nelonge al Vítkovice serĉi laboron, li ne havis eĉ minimuman imagon pri tiu grandega uzino, kiu fakte estas tuta urbo. Neniam li estis ĉi tie kaj la arbaraj segejoj en la valoj de lia regiono, aŭ eĉ la segejo en la distrikta urbeto, kie li jam kelkfoje laboris, estus nur sablero en ĉi tiu maro da fero, koakso, flamo, ardo kaj ŝvito. Miloj da homoj en ĝi moviĝis, miloj eliradis kaj ree eniradis en ĉi tiujn ŝtalajn profundaĵojn, malaperis en ili kvazaŭ subakviĝistoj, por ke post ok horoj el ĉi tiu infero elnaĝu ombroj kovritaj de polvo, lavitaj de ŝvito kaj bruligitaj de fajro.

En la unua tago de laboro, kiun li feliĉe ricevis tuj kiam li sin anoncis, li estis tute surdigita de ĉi tiuj ega bruoj, fajfado kaj tondrosimilaj frapoj. — La neprecizaj, reciproke sin trapenetrantaj kaj tamen tiel fortaj ondoj de sonoj atakis liajn orelojn, kvazaŭ li starus sur roka pramontaro en kiun sovaĝe kaj senfine batas mara alfluo. Pri la alfluo oni vidas de kie ĝi venas, sed ĉi tie — frapo post frapo de malproksime kaj de proksime, oni ne scias de kie, ŝiras la orelojn, tamburas sur la tempioj, kiuj eĉ sen tio estas ŝvelintaj ĝiskreve pro la senĉesa zumo de ĉiuj eblaj sonoj venantaj el la profundaĵoj de l' fera infero.

Pavel perdis dum kelkaj tagoj la kapablon distingi unuopajn sonojn, li indiferentiĝis kaj perceptis nenion krom la unutona, de tempo al tempo babilema parolo de fero kaj ŝtalo.

Kaj la okuloj, kiuj estis al kutimiĝintaj flugi tra valoj, de l' deklivo al deklivo, en la unuaj tagoj timigite frapadis sur la nigraj muroj de konstruaĵoj, en kiuj Pavel estis ensorĉita kun miloj da aliaj laboristoj, por ke ili revenu kaj rigardu nur la manojn kaj la laboron. El la tuta sovaĝejo de materialoj, sonoj kaj odoroj Pavel longan tempon ne kapablis elserĉi firman

La tutan verkaron de P. Jilemnický (1901—1949) oni povas konsideri fundamento de la novtempa slovaka literaturo kun la socialismaj tendencoj. Lia unua romano „Venka falo“ (1929) ankoraŭ abundas je lirika patoso, sed jam lia novelkolekto el Kysuce — nordslovaka regiono, kie la aŭtoro agadis kiel instruisto — malkovras radikojn de la mizero de la tieaj terkulturistoj, preparante la vojon por la sociale batalema romano „Kampo neplugita“ (1932). Ankaŭ la romano „Sukerpeco“ (1934) montras la pezan ekzistadon de la agrikulturaj laboristoj. Al la tutmonda socialisma literaturo Jilemnický kontribuis precipe per la romano „Kompaso en ni“ (1937) en kiu li rekonsideras la problemon pri la homa feliĉo — laŭ Jilemnický ĝi estas en daŭra antaŭeniro de l'homo, en lia konstanta sopiro pri la libereco kaj ekkonado.

## EN FERFABRIKO

punkton, de kiu li estus povinta almenaŭ por momento rigardi ĉion kaj almenaŭ iomete interkonatiĝi kun sia ĉirkaŭaĵo. Unu aferon li sentis per la okuloj kaj ankaŭ per la oreloj en sia laborloko: li venis en teruregan gigantan maŝinon, en kiu mankas sento kaj vivo, en kiu estas nur terura senĉesa movado, rapido, turnado de radoj kaj radetoj, vagonoj kaj vagonetoj, materio, materio, materio...

Minaĵo, koakso, kalkŝtono, unu vagono post la alia — centoj da vagonoj tage.


Dum la unuaj dekkvar tagoj, en kiuj li klopodis plenumi sian laboron bone kaj ĝustatempe, kreskis en li imago de l' uzino; ne de tio, kion li vidis, sed de tio, kion li aŭdis. Kaj kvankam tio

ne rajtigis lin fari konkludojn, li kontentiĝis provizore per la konstato: „Ĝi estas grandega uzino“. Li vidis de malproksime, kiam li iradis kaj revenadis de laboro, grandegajn nigrajn kamentubojn, el kiuj senĉese eliradis fumo kiel funebra flago, li vidis fortikajn turojn de altaj fandfornoj, tutan serion da aervarmigiloj, tubojn por faŭkogasoj, kiuj etendiĝadis malproksimen tra la vastaj kortoj de l'uzinapartamentoj, li vidis senfinajn procesiojn de malgrandaj vagonetoj sur pendfervojo, en kiuj oni forverturigas varmegajn kaj akran skorion; li vidis vespere, ke tie fakte ne ekzistas vesperoj, ke la steloj ne lumas, ke ilin englutis grandega ruĝa buĉego de senfina fajrego, kiu sangruĝigis la vastan horizonton kaj la firmamenton super la kapo.

Kaj tamen — kvankam Pavel ĉion ĉi vidis, kvankam ĉio ĉi per ega atako penetris en lian primitivan menson kaj desegnis pli klarajn konturojn de tio, kio en lia imago fariĝis „grandega uzino“, li ne trovis ŝlosilon de kono, same tiel ĝin ne trovis laboristoj laborantaj kelkajn jarojn en unu apartamento, en unu ejo, sen tio ke ili konus unu la alian. Li vidis kamentubojn — sed ne sciis al kia parto de la uzino ili apartenas; li vidis fandfornojn — kaj eĉ konjekton li ne havis pri ilia laboro, kvankam la tutan tagon li laboris ĉe la transportado de krudmaterialo, plenigante ilian nesatigeblan ardantan buŝegon; li vidis ĉe ĉiu forno tutan vicon da altaj rondaj varmigiloj — li konis nek ilian nomon, nek ilian taskon; li vidis grandegajn tubejojn kurantajn tra la tuta uzino — en lian menson ne venis eĉ unu sola penso, imago aŭ sperto, kiu estus kapabla trankviligi lian mutan miregon.

Pavel estis englutita de grandega uzina koloso tiel, kiel malaperas guteto en granda kvanto da akvo: sen postsigno.

El la romano  
„Kampo neplugita“  
trad. P. Rosa



Desegnaĵo  
Pavel Rak

„Ekde sia fondiĝo la Ligo de Nacioj konstante ricevas la leterojn, kiuj instigis akcepton de unu internacia helplingvo, speciale de internacia lingvo Esperanto, kiu estas disvastiĝinta en multaj landoj kaj instruata en la lernejoj de multaj ŝtatoj. La ĝenerala sekretariato kun interesiĝo ekzamenis la proponojn; el vidpunktoj scienca, humanisma, komerca, fremdultrafika — kaj ĉefe el la vidpunkto de laboristaj medioj — ili sentigas urĝan bezonon

Ĉeĥoslovakio, krome delegitoj de diversaj aliaj lernejoj el 28 landoj.

Al dissenditaj demandfolioj venis grandkvante respondoj de la ŝtatoj-membroj kaj de la koncernaj organizoj. Apartan interesiĝon pri tiu ĉi afero karakterizas la fakto, ke respondis ankaŭ la ŝtatoj, ankoraŭ ne mebrigitaj al LN, ekz. Germanio, Sovetio, Usono, Hungario. La instruadon de Esperanto apogis multaj famaj verkistoj, scienculoj kaj politikistoj. Tiamaniere,

la ĉeĥoslovakaj urboj. Analizante la signifon de la Internacia Lingvo kaj la avantaĝojn, kiujn alportus ĝia ĝenerala enkonduko, la raporto i. a. skribas:

„Kiam la vicsekretario de LN ĉeestis en la jaro 1921 la XIII-an UK en Prago — kie kunvenis ĉirkaŭ 2500 homoj preskaŭ el ĉiuj landoj de la mondo — li miris pro la nobla spirito kaj humanisma entuziasmo de tiu ĉi kunveno.“  
Gravas rimarkigi, ke dum la sama

## DATREVENO DE GRAVA LINGVOPOLITIKA INICIATO EN LIGO DE NACIOJ

# PRI ESPERANTO EN PRAGO KAJ ĜENEVO

pri forigo de lingvaj baroj, kiuj malfaciligas kontaktojn inter la popoloj.“

Per tiuj ĉi vortoj komenciĝas la raporto akceptita de la III-a Ĝenerala Asembleo de la Ligo de Nacioj en 1922. Tamen ĝian devenon ni trovas jam en la periodo de la unua Ĝenerala Asembleo en 1920, kiam reprezentantoj de 14 ŝtatoj-membroj sugestis, ke la Ligo proponu la ĝeneralan instruadon de Esperanto en elementaj lernejoj. Tiun ĉi proponon pritraktis la dua komisiono de la Asembleo kaj en la ferma dokumento ĝi esprimis sian konsenton kun la propono. Ĝi apelacis al kromaj informoj ricevataj de la reprezentantoj de subskribitaj ŝtatoj — inter ili ĉeĥoslovaka — laŭ kiuj en pluraj lernejoj de la respektivaj landoj oni instruas Esperanton. Tamen la komisiono rekomendis al la ĝenerala sekretariato prepari fundan kaj detalan raporton pri la aplikado de la lingvo por la dua Ĝenerala Asembleo.

La Ĝenerala Asembleo en 1921 komisiis la ĝeneralan sekretarion fari la proponitan analizon kaj samtempe ĝi decidis fiksi la aferon pri la lerneja instruado de Esperanto en la tagordon de la tria Ĝenerala Asembleo. Ankoraŭ antaŭ ol okazis la dua Ĝenerala Asembleo, la afero tiom elvokis la atenton de la vic-sekretario de la Ligo, japana diplomato I. Nitobe, ke li en aŭgusto 1921 oficiale partoprenis la XIII-an Universalan Kongreson de Esperanto en Prago. La decembra asembleo de LN petis i. a., ke la ĝenerala sekretariato oficiale informu la ŝtatojn-membrojn pri la praga kongreso.

Por plenumi la komision la sekretariato dissendis detalan demandaron al la registaraj membroj de LN kaj al koncernaj organizoj, samtempe ebligis en siaj salonoj aranĝi konferencon pri lerneja instruado de Esperanto. Tiun ĉi konferencon oficiale partoprenis delegitoj de 16 registaroj, inter ili ankaŭ

surbaze de riĉa dokumentaro, estis preparita la raporto de la ĝenerala sekretariato, kiun I. Nitobe prezentis antaŭ la tria Ĝenerala Asembleo de LN en la jaro 1922. La raporto konvinke kaj pozitive aprezis Esperanton en la instruata sfero kaj ĝenerale kiel rimedon de la internacia rilatado.

En la parto mencianta Ĉeĥoslovakion ni povas legi i. a.:

La 29an de marto 1921 dekreto de la ministro pri instruado permesis la fakultativan instruadon de Esperanto en ĉiuj lernejoj, kie troviĝas ekzamenitaj instruistoj. En la lernojaro 1920/21 oni permesis la instruadon jam en 15 elementaj, 3 mezgradaj kaj unu industria lernejoj. La ministerio aprobis eldonon de ĉeĥa kaj germana lernolibroj kaj nomis tri ekzamenistojn, du en la ĉeĥa kaj unu en la germana lingvoj. Ĉeĥe aperis ankoraŭ 15 lernolibroj kaj 6 vortaroj. Informilo de la ministerio de instruado (majon 1921, n-ro 15) preskribas, ke en la komercaj lernejoj posemajne du horojn estu instruata Esperanto laŭ instruplano, post kiam la Internacia Lingvo estis instruata jam en la lernejoj de Brno, Beroun, Hořice, Liberec, Plzeň kaj Žatec.

Esperanto tre disvastiĝis en Ĉeĥoslovakio. En ĉiuj urboj kaj en multaj vilaĝoj funkcias Esp. grupoj. La XIII-a kongreso de Esperanto okazis sub la aŭspicio de la registaro, kiu rigardis Esperanton kiel gravan faktoron de la monda kulturo kaj de la monda paco. La ministerio pri poŝtaj aferoj registris la esperantistajn oficistojn kaj la direkcion de la fervojoj donis krompagon al tiuj fervojistoj, kiuj scipovis Esperanton. En Ĉeĥoslovakio aperis ok Esp. revuoj.

Cetere la raporto ankaŭ en aliaj rilatoj aludas pri la avantaĝaj ĉeĥoslovakaj spertoj en la instruado de IL, ĝia utiligo en la tieaj internaciaj foiroj kaj en la komercaj ĉambroj de

kongreso fondiĝis Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu starigis al si la celon „utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda, kiel eble plej bone kaj digne plifaciligi la interrilatojn de la membroj, tiel kreskigante ĉe ili fortikan senton de homeca solidaro, ... Ankaŭ tiurilate estas interesaj la vortoj de la dokumento cititaj komence de tiu ĉi artikolo.

La plejmulto de la landaj laboristaj movadoj jam delonge apogis Esp-on kiel optimuman ilon de la internacia komunikado kaj ili ankaŭ altgrade rolis en tio, ke la afero de IL estu traktata sur la plej alta internacia forumo. Neniel ŝanĝas moralan valoron de tiu ĉi grava iniciato ĉe LN la fakto, ke la plano finfine ne realiĝis pro obstakloj de Germanio kaj Anglio, grandpotencoj, kiuj defendis siajn proprajn lingvaj privilegiojn. Tamen, ankaŭ la angla registaro, kvankam kun rezervo, rekonis — kiel atestas la raporto — la taŭgecon de Esperanto kiel internacia lingvo. Multaj anglaj kaj francaj sociaj organizoj — inter ili sindikataj — staris apud Esperanto.


La hodiaŭa Esperanto-movado atingis — malgraŭ longaj suferoj pro la varma kaj malvarma militoj — la novan etapon de sia evoluo, sentebila ankaŭ en la ĉeĥoslovaka kaj hungara movadoj. Kaj same en Sovetunio, kie renaskiĝis la tutlanda esperantista asocio. Simile en Anglio, kie agadas naŭdekmembra amika rondo de parlamentanoj. Kun ilia kontribuo oni ŝatus konstrui novajn bazojn en la anglaj sindikata kaj kooperativa movadoj. Kaj tio ĉi ebligas, ke la afero de la Internacia Lingvo reapere ankaŭ en la tagordo de UNO, en la spirito kaj laŭ la celo de la unua iniciato antaŭ sesdek jaroj.

*Imre Szenes*



Foto Milan Labašta

## PROTEKTATA HEREDAĴO



En la jaro 1962 ĉeĥoslovaka registaro proklamis tridek tri kaj en 1978 pluajn tridek du objektojn naciaj kulturaj memorindaĵoj. El ili dudek troviĝas sur la teritorio de la ĉefurbo Prago, kies historia kerno estas la plej ampleksa (600 hektaroj) laŭleĝe protektata arkitekta komplekso en la mondo.

La ŝtato elspezas konsiderindajn monsumojn por gardi kaj renovigi la monumentojn de la pasinteco. Ekzemple en 1977 sub la aŭspicio de la Praga oficejo por la protekto de la memorindaĵoj oni entreprenis faklaborojn en 39 objektoj en suma valoro de 2400 milionoj da kronoj (ĉirkaŭ 22 milionoj da dolaroj).

Depost la jaro 1948 oni renovigis en Prago pli ol cent historie gravajn konstruaĵojn aŭ arojn da konstruaĵoj. Menciindaj estas ekzemple la Praga Kastelo, la monaĥejo de Strahov, kie troviĝas nun Monumento de la nacia literaturo, la Betlehema Kapelo, kie komence de la 15a jarcento predikis Johano Hus, Karolinum, kiun konstruis Karlo la IVa, pluraj domoj sur la teritorio de la iama Juda urbo, multaj preĝejoj kaj palacoj. En 1976 komenciĝis la ĝenerala renovigo de la katedralo Týn el la husana epoko. Ekde 1974 historia riĉeco de la metropolo kreskis per pliaj 84 objektoj, ĉar kun Prago unuiĝis tiam tridek komunumoj de la mez-bohemia regiono.

Vigla konstruaktivecoj en la lastaj jaroj, unuavice konstruado de la metro, kaŭzis novajn problemojn rilate la efikan protektadon de la subteraj trovitaĵoj. Pri la novaj objektoj estis instalita ekspozicio, kiu kontribuis al pli funda ekkonado de la pragaj memorindaĵoj.

Kiel precipan taskon oni rigardas protektadon de valora arkitekturo de la lasta jarcento — tion elmontris la pragaj simpozioj kaj la ekspozicio „Prago 1860—1960“ kun internacia partopreno kaj sub la aŭspicioj de Unesko kaj de la landa ministerio de kulturo. Alia internacia simpozio en Prago, 1975, okupiĝis pri la temo „Memorindaĵoj kaj la vivmedio“.

La praga protektada oficejo entreprenas ampleksan klerigan agadon por instrui estimon kaj intereson pri la heredaĵo de la pasinteco ĉefe al la juna generacio. Krom prelegoj kaj eldonado de diversaj publikaĵoj ĝi aranĝis ekzemple konkurson por lerneĵanoj, en kiu sukcese partoprenis cent mil gejunuloj.

## POETO DE LA PROZO

VLADISLAV VANČURA

1891 - 1942

Vladislav Vančura okupas eminentan lokon en la ĉeĥa intermilita literaturo kaj en la moderna prozo li rolas analoge al alia elstara lia samtempulo, Vítězslav Nezval; ankaŭ li daŭre serĉis la novajn vojojn. Samtempe li estas en sia tuta verkaro profunde aŭtentika kaj neimitebla. Io estas komuna al ĉiuj noveloj, romanoj kaj dramoj de Vančura — ilin verkis poeto de la prozo en la plej fajna senco de la vorto, prozisto, kiu per siaj metaforoj kapablas provizi kelke da generacioj de poetoj.

Li provadis kaj eksperimentis serĉante esprimeblecojn ekde la unua ĝis la lasta frazo. Li ne timis ekstremon provante sian plejblon, tamen tiel, ke la prozo restu prozo kaj samtempe esprimu ĉiujn fenomenojn de la vivo kaj la aŭtoran starpunkton. Reliefe manifestiĝis tiuj ĉi tendencoj en la baladeca „Lasta juĝo“ (1929) — survoje al ĝi estigis ankaŭ emociiga kontraŭmilita romano „Kampoj por plugi kaj militi“ (1925). Lirika patoso de la verkinto poste pli kaj pli moderiĝas atingante rafinite simplan esprimon, ekzemple en „Tri riveroj“ kaj en la monumentaj „Bildoj el la historio de la ĉeĥa nacio“.

Nur malmultaj aŭtoroj kansciis kiel Vančura pri la kapablo de la lingvaj rimedoj. Li sekvis spurojn de la malnova ĉeĥa lingvo kaj profitis de ĝi per arkaismoj kaj bibliismoj. La vortefikon li atingas per skrupula elektado, la frazojn li cizelas kiel diamantojn, revivigas riĉecon de vivantaj kaj forgesitaj popolaj sentencoj kaj diraĵoj. Sekve de tio pluraj liaj verkoj estas nefacile tradukeblaj.

La „Kampoj por plugi kaj militi“ estas lia unua fama libro, patosa protesto kontraŭ absurdeco de la milito. Diference de pluraj tiutemaj verkoj de lia epoko, kiuj kutime prezentas militeventojn kadre de iu okazaĵo aŭ kombinas ilin kun kronikista rakontado, Vančura konceptas la militan okazadon en ties totaleco, li klopodas per sortoj de individuoj kaj de kolektivoj artisme bildigi ĝin en ĉiuj eblaj dimensioj, li spekuligas ĝin grimace, ĝis monstre timiga aspekto. Laŭ mondrenoma ĉeĥa kritikisto F. X. Šalda lia romano estas „granda eposo“, „eposa mito“, kiu preteratentas psikologion kaj anstataŭ romanverkista pentrado ĝi konstruas. Laŭ tiu ĉi kompleksa superrigardo pri la milito la „Kampoj por plugi kaj militi“ multe identas kun „Švejk“ de Jaroslav Hašek.

La milito rolas ankaŭ en la „Tri riveroj“, alia elstara romano de Vančura. Per filmepizodaj scenoj li konfrontas la ĉeĥan vilaĝon kaj malgrandan urbon kaj la revolucion en Ruslando — per la okuloj de la protagonisto, ĉeĥa soldato sur la rusa batalkampoj.

Meze de la tridekaj jaroj Vančura verkas la dramon „Lago Ukereve“ el afrika medio; ĝi estas alvoko kontraŭ la koloniismo, faŝismo kaj perforto entute. La nazia feroco baldaŭ atingis ankaŭ la landon de la aŭtoro kaj Vančura, kiel multaj aliaj, fariĝas la viktimo. En la jaroj de la okupacio de Ĉeĥoslovakio li estis enkarcerigita kaj ekzekutita.

La verko, kiun li postlasis, eniris trezorujon de la ĉeĥa nacia kulturo kaj la protesto kontraŭ la milito, tiu plej monstra malamiko de la homo kaj homaro, daŭre eĥas el paĝoj de liaj libroj. Tion ĉi li mesaĝas en la „Kampoj...“:

„Malnovaj aferoj ĉesas ekzisti. Ĉio, kio majestis, nun estis bagateligita, la fajroj signifas bruligadon, ekzekutista hakilo estas ridinda, la pano estas formangita kaj la torturita kapo de la popoloj sin klinas ŝultren.“

Venas la labortago, la stelo kaj la nova jarkalkulo, ĉar de la militfino, samkiel de la mondokreo oni kalkulos la jarojn...

Militojn tralosas kribrilo aranea. La rekad-epoko estas frakasita kaj komenciĝas la tempo por la laboristoj. La fajroj kaj la sango kiel montaro kaj kiel maro disdividos ambaŭ epokojn.“

(kni)



### VLADISLAV VANČURA KAMPOJ POR PLUGI KAJ MILITI (FRAGMENTO)

Aferoj delonge heroldataj progresis al sia fino, ĉar neniu kaŝos fajron per mantelo kaj neniu sekretigos ardan karbon en fermita polmo.

Sufiĉe longe vi ekzercadis vin en la militscienco, selis ĉevalojn kaj heroldis tiun ĉi momenton, kiu venas kaj iu ajn sciis, ke ĝi okazos.

Regimentoj blua kaj ruĝa, malserena kazerno kaj stalo plena de retenata galopo apartenigos siajn kolorojn kaj antaŭ ol oni ekiros la vojon sangoplenan kaj en larĝan batalzonon, kapeloj muzikos sur la placo.

Idiota ĵurnalisto, kiu trifoje varios, ol solida bato lin kadavrigos finfine, krias kaj sonorvoĉe mesaĝas, anoncas kaj distrumpetas pri iu morto, kiu nenion rilatas kaj pro kiu eĉ la imperiestro ne ploras.

Glumo forbrulinta pro la fajro kaj la nomo senfama kaj nekonata, forgesita en la horo de l'morto ankaŭ kun sia epiteto. La nomo de l' avidulo pri la gloro kaj pri la potenco, kiu evitis lin.

La nomo de l' vireto kaj lia nemeritita forpaso. La nemeritita forpaso, bagatela informo, bedaŭrinde tiomfoje ripetata en ĵurnaloj. Eta vespiro kaj la momenta atento pri malfeliĉo tro malproksima.

Kie estas Sarajevo, kie estas tiu lando?

Pia duko tien kaj reen veturante meze de ĝi estis mortigita de junulo, kiu sin pereigis samtempe kun li.



Duoble domaĝe estas pri tiuj ĉi mortigoj, tiuj de la korpo kaj de la forto. Ĉu estos senmanigitaj la murdistoj, kiuj denove ŝargas la armilon, ĉu sufiĉas averto kaj admono al la venĝantoj? Ekzistas nenia forto por liberiĝi de ĉi maljustaĵoj tiel malnovaj, kaj la flaga ruĝo ĝis nun senenhavas.

La germanaj urboj kriegas kaj la malvigla Ĉeĥio devas pridecidi. La milito venigos tenebron, kiu daŭros tri jarojn.

Dume la viroj pretigas tornistrojn por treni ilin al kazernoj kaj ĉia furiozo moderiĝas en plendado silentiĝanta sur la placoj.

Tiu ĉi kvietiĝo estos malbenita, ĉar el ĉiuj aferoj ĝi pleje similas al timo.

Klaĉa avizo kaj ĉagreniga bildo pri la mizerulo, kiu preĝas por siaj armeoj kaj kriincitas la militon, movigis la tersurfacon. Enirante pordegojn de monstraj buĉejoj, kaj en epokon de murdado iuj malŝparis pri laŭdoj, iuj frenezis je predo, aliaj iris heziteme kaj denove aliaj ebrigiĝis sen miksi la entuziasmon kun vino. Estis la tempo por drinki.

En la drinkejo proksimiĝis vespero, eble sufiĉe morna, por ke mi restu sidĉetabe, ĉar vino gajigas la koron. Ĉar la vino estas senpage.

Kvin husaroj, al kiuj la milito donis iom da graveco, levis la glasojn denove plenajn kaj laŭtigis la voĉon: „Kresku la herbo! Melku la virbovon tiu kanajlo, kiu fiaranĝis ĉi amuziĝon!“

Trad. O. Kníchal

## AKTIVECO DE PACA SEKCIO DE ĈEA

Prof. Albert Schweitzer (14. 1. 1875 — 5. 9. 1965) respondis je demando, kial estis perdita reciproka konfido inter nacioj, jene;

„Ĉion kaŭzis ekzisto de nukleaj armiloj. El tiu mizero povas savi nin nur tio, ke ni vekos prudenton kaj energion, ne plu retardi en sia cerbumo en senlima nehomeco al kiu ni estas kondamnitaj per ekzisto de nukleaj armiloj, sed senti sin esti ligitaj per la homeco, kiu postulas likvidon de nukleaj armiloj. Tiel povus ekesti ebleco denove elkrei atmosferon, kiu permesos al nacioj kun konfido traktadi inter si.“

Kelkaj povas dubi, ke tia etika ŝanĝo ekestus. Sed kial ne? Homeco estas nia propra esenco. Kiam ni kun seriozeco konsciiĝos — nin mem, ni ne povos agi alie, ol decidiĝi por la opinio de la homeco.

Ni ĉiuj scias, ke tio estis tre saĝaj vortoj. Nia paca sekcio streĉas forton, kiel eble plej multe helpi en la batalo por forigi nukleajn armilojn. En tiu klopodo tre helpis al ni japanaj pacamikoj, kiuj donace sendis al ni fotoalbumojn „Hiroŝima — Nagasaki“, bilda dokumento pri la atombombado. Tiu donaco instigis nin, ke la komitato de paca sekcio al ĉiuj rondetoj sendis alvokan leteron, ke ili organizu inter esperantistoj prelegojn pri nuklea danĝero kaj uzu la libron kiel dokumenton de teruraj postsekvoj. Paroladoj estis organizitaj ne nur inter esperantistoj, sed la albumoj estis pruntitaj al diversaj societaj organizaĵoj, kie diskutoj havis tre bonan rezulton. Ĝis hodiaŭ jam estis organizitaj prelegoj en 56 lokoj de Ĉeĥoslovakio kaj konstante venas postuloj pri la prunto de tiu ĉi unika libro. Laŭdinda fakto estas, ke la rondetoj en Třebíč preparis enkondukan skriban prelegon por ĉiuj. De plua rondeto estis la prelego surbenigitaj. Aliaj aktivuloj preparis diapositivojn, kiuj vagas kun la libro. Alia rondeto preparis mallongan filmon pri diskuto, kiun instigis trarigardo de la bildoj. Kelkaj kluboj sukcesis pri pre-

lego publikigi artikolojn en tagaj gazetoj. Unu aktivulo fondis kronikon de eldiroj, kie ĉiu trarigardanto povas skribi sian impreson pri la libro. Libro estis ankaŭ uzita por instuado en alta lernejo en studobjekto „radioaktivito“. Ni kredas, ke pluj rondetoj ankaŭ iniciative disvolvos novajn metodojn kaj manierojn por la plej efika eluzo de bilda dokumento. Mi volas esprimi sinceran dankon al japanaj pacamikoj, kiuj donis per la eldono de tiu libro decidan paŝon.

Kortuŝa estas jena letero de metilernantoj:

Eldon-komitato  
por HIROŜIMA — NAGASAKI  
TŌKYŌ-to Minato-ku Siba 1-4-9  
Heiwa Kaikan  
105 Japanio

Estimataj japanaj geamikoj, hodiaŭ, la 2-an de aprilo 1980, ni, metilernantoj kaj instruistoj de mez-fak-lernejo en urbo Sokolov (strato de Komenský) — Ĉeĥoslovakio, trarigardis Vian libron pri atombombado de urboj Hiroŝima—Nagasaki.

Ni estas junaj kaj pri militoj ni nur aŭskultis. Ni neniam travivis terurajojn, kiujn la militoj alportas.

Ni estas feliĉaj, ke ni povas en paco vivi, lerni, amuzi sin. Neniam ni volus travivi tion, kion montras bildoj kaj fotoj kaj parolas vortoj sub la bildoj en Via libro.

Ni ĉiuj estimas Vian penadon, kiun vi dediĉis al la eldono de la ampleksa kolekto de malgajaj dokumentoj, kiuj respegulas terurajojn de la atombombado.

Ni elkore deziras amikecon inter ĉiuj popoloj de la mondo kaj tutmondan pacon.

Paca sekcio de ĈEA daŭrigas en organizado de solidareca kampanjo por Vjetnama socialisma respubliko. Esperanto rondetoj kolektas monon kaj lernhelpilojn. Dank'al oferemeco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj povis nia asocio forsendi duan sendaĵon. Ni transprenis super lernejo NGO SI LIEN

en Hanojo patronecon kaj lernhelpiloj estis transdonitaj al ili. Infanoj volante al ni esprimi dankemon, sendis al ni 40 desegnaĵojn, kiuj esprimas vietnamo-ĉeĥoslovakamikecon. Tiuj desegnaĵoj nun cirkulas tra tuta Ĉeĥoslovakio kaj estas al dispono de rondetoj por dokumenti, ke Esperanto helpas al interkompreniĝo kaj internacia amikeco. Nia celo estas, ke ni trovu por tiu kampanjo komprenon ankaŭ inter neesperantistoj. Sekve de tio ni volus atingi, ke iu lernejo en ĈSSR ĝemeliĝu kun plua lernejo en Vjetnamio.

UEA interesiĝas pri Vjetnamio, Laoso kaj Kampuĉio. Ĝi fondis komisionon por organizi moralan kaj materialan helpon en la vastigo de Esperanto. Nia aktiveco estas taksata kiel bona ago je tiu ĉi kampo. En la frunto de komisiono aktivis s-ano Renato Corsetti.

Ĉi jare aŭtune ni preparas konferencon de nia paca sekcio, kie ni devas pritaksi nian trijaran laborplanon. Ni elektos novan komitaton kaj akceptos planon de nia aktiveco. Ankoraŭ pli intime ni volas kunlabori kun Ĉeĥoslovaka packomitato laŭ interkonsentita kontrakto.

Por instigi aktivecon de rondetoj ni kunlabore kun metodiko-propaganda komisiono anoncas konkurson inter rondetoj en ĈSSR „AMIKECO 1981“. Ĉefe estos instigitaj ĝemeliĝaj kontaktoj kun eksterlando. Konkurson ni fermos per ekspozicio en la jaro 1982 dum la kongreso de ĈEA.

De Korea Esperanta Asocio el Japanio ni ricevis peton helpi en la batalo por liberiĝi malprave arestitan s-ron KIM De-jung. Tuj ni dissendis ĉiujn bildkartojn eldonitajn por helpi en lia liberigo.

Paca sekcio de ĈEA streĉas fortojn kaj kunlaboras kun ĉiuj esperantistoj en tuta mondo, kiuj volas helpi en paca batalo. Paco devas venki en la tuta mondo.

Drahomír Kočvara

ÉVA TÓFALVI  
OLDŘICH KNÍČAL<sup>(1)</sup>

## PRELEGO PRI SHELLEY



La Premio Raymond Schwartz, kiun Universala Esperanto-Asocio unuafoje proklamis por la plej bona beletra prozverko en la Internacia Lingvo, estis atribuita okaze de la pasintjara UK en Stokholmo al É. Tófalvi, Hungario, kaj O. Kníchal, Ĉeĥoslovakio, pro ilia romano „Kiu semas plorante...“, kies temo estas persekutado de la Esperanto-movado en la jaroj de la „bruna pesto“ Ĝi estas unua beletraĵo en Esperanto, kiu traktas la movadon kiel atentindan socian fenomenon. La subaj fragmentoj aludas la eventojn de 1933, kiam la nazioj uzurpis la potencon en Germanio.

### FREGMENTOJ EL LA ROMANO

La angla literaturhistoria prelego okazis en granda aŭditorio en la tria etaĝo. Almenaŭ tricent studentoj venadis al tiu altnivela serio de prelegoj, ankaŭ tiuj, kies fako ne estis la angla, venis aŭskulti kun muta silento. Spite al tiu nebula, prujnornamita mateno, spite al ĉiam glacikovrita trotuaro antaŭ la universitato.

En tiu morna januara mateno subite audiĝis ŝriko en la granda aŭditorio — kaj ties reeĥo sonis dum kelkaj sekundoj en longaj koridoroj.

Mi eniris antaŭhalon kaj demetis la surtuton. Neniu rimarkis mian aperon kaj mi indiferente okupis randon de la benko kaj eklegis la poemaron de Shelley.

— Ne povas okazi! — kriis denove iu samklasano, — la angloj ne lasos tion!

— Kio okazis? — mi turniĝis al unu apudstaranto, kiu ŝajne preterlasis la disputon kaj senkonsile gapis.

— Strange, filologo ne legas gazetojn... aŭ ĉu tio estas natura afero, sinjoro kolego? Ĉu vi pensas, ke la historio ĉirkaŭiros vian eburan turon?

— Pardonu, ĉu vi ne povus esti pli konkreta?

— Hitlero fariĝis kanceliero — se tio entute ion diras al vi...!

— Kaj pro tio malfruiĝas profesoro Bora?

— Jes, pro tio... pro tio, — li replikis kaj kun malestima gesto foriris.

Mi ne havis la tempon por peti la pli detalan eksplikon de alie, ĉar ĝuste envenis profesoro Bora. Mi atendis, ke li faros iaspecan aludon, sed nenio simila okazis. Modeste, kiel kutime, li diris nur:

— Gesinjoroj, mi petas vian pardonon pro la malfruiĝo. La temo de mia prelego — kiel jam antaŭmontrite — estas unu periodo el la vivoverkado de Percy Bysshe Shelley.

Momente mi ne atentis, miaj pensoj vagadis ĉirkaŭ tiu Hitlero, pri kiu mi sciis nenion. Karlo nepre devas funelverŝi iom da scio en mian kapon.

Nekutima prelegmaniero de Bora alarmis min el tiuj ĉi pripensoj. Tio ne estis bone konata, mallaŭta kaj lante klariganta voĉo — ĝi estis pasia kaj flugilhava. Mi ekatentis. La preleganto analizis la verkon „Liberigita Prometeo“, en kiu la falo de Jupitero simbolas la neeviteblon de fiasko de tirano. Tiu ĉi dramo — deklaris profesoro Bora — rekonceptas la antikvan miton pri Prometeo, por ke la epoko de Shelley kaj la postaj generacioj komprenu, ke la tiranio estas ĉiam venkota.

— Dankon, gekolegoj, pro via atento — diris mallaŭte

Bora. Tiu ĉi voĉo, denove modera kaj ĝentila, jam estis konata al ĉiuj.

— Kaj tiam okazis io neatendita — almenaŭ por mi: sidantoj en la unuaj vicoj eksaltis kaj komencis aplaŭdi. Ie tie audiĝis vivuoj al la preleginto, kiu dume foriris.

Mi havis kuriozan senton — nun mi devus preni starpunkton kaj unu el la eblecoj estis ekstari kaj aplaŭdi kun la ceteraj. Interese, ne iuj aplaŭdis — el tricentkapa amaso minimume dudek ne aliĝis, nur explore ĉirkaŭrigardis. Min frapetis frostotremo kaj mia mano ne kapablis leviĝi. Fakte mi simpatiis kun Bora, sed nur tion, kiom studento kutimas simpatii kun sufiĉe tolerebla profesoro. Nenian apartan inklinon mi sentis rilate lian personecon, kiun mi trovis cetere tro seka. Nature, la aplaŭdantoj manifestis ne nur sian apartenon al lia humanisma flago, sed ankaŭ sian indignon kontraŭ Hitlero.

Mi havis nenian politikan konvinkon nek tiam, nek en la jaro 1935, post mia doktoriĝo kaj membriĝo al faŝista partio.

— — —

Profesoron Bora oni ne plu povis vidi post lia neforges-ebla prelego. Li pensiĝis. La kialon mi komprenis baldaŭ — pot la finlego de la libro prunteprenita de Karlo. Ankorau pli klare reliefigis la kaŭzo de lia abdiko, kiam aŭtune, en la sekva lernejarro, aperis en la universitato Giulio Tettamanti, profesoro pri la moderna itala literaturo. Liaj prelegoj al mi komprenigis, ke la ideoj skizitaj en la libro de Hitlero ne plu estas imgoj de la aŭtoro, sed ke ili estas efektivigitaj almenaŭ en unu lando. Tettamanti pasigis kvin jarojn en Italio kiel universitata lektoro, konatiĝis kun la nova ideologio kaj ties realigado. Adapti ĝin en sia patrio li sentis sia misio.

Du jarojn — kvar semestrojn — mi aŭskultadis lin, kaj kun la tempopaso ĉiam pli kaj pli malfacile mi povis min sendependigi de lia pensmaniero. Li havis unikan metodon por disvastigi la novan ideologion, plej bonan, kian oni povas imagi. Li neniam propagandis la faŝismon senkaŝe, eĉ neniam konfesis, ke li estas aŭ iam estis faŝisto. Sed li estis fiero pri sia itala deveno, skribante ekzemple sian baptonomon laŭ la itala ortografio kaj senĉese akcentante sian apartenon tiurilatan. Li estis altstatura, energia viro, liaj gestoj estis larĝaj, parolmaniero lautvoĉa, preskaŭ kria, kvazaŭ li estus konstante citanta la Duĉeo'n. Li deklamis spektaklostile, foje prezentante kun elementa praforto la novtempan italan poezion.

Ne nur simpatioj faris min lia disĉiplo. Spertinte la foriron de profesoro Bora mi opiniis, ke la tempo favoras ne liajn sekvantojn, sed tiujn de Tettamanti. Mi rakontis pri li al Karlo, speciale pri lia parolmaniero, kiu ege similas al tiu de Mussolini.

— Ĉu en despotisma reĝimo, kie regas diktatoro, vi trovas tion mirinda? diris Karlo. — Forpasos ne tro multe da tempo kaj ankaŭ vi hurlos same...

— Hurlos!? — Mi estis ŝokita.

— Kiajn esprimojn vi uzas! Kvazaŭ ne vi estus direktinta min sur tiun ĉi vojon.

Karlo letargie ridetis.

— Malgranda miskompreno, mia knabo. Vi scivolis pri Hitlero, nu, kaj mi disponigis al vi lian verkon — por legi. Kiu povis supozi, ke vi tuj, sen ajna kritikemo akceptos? Kiu povis supozi, ke vi tuj, sen ajna kritikemo akceptos lian idiotan demagogion?

Mi ofendiĝis kaj respondis preskaŭ kun malŝato:

— Vere, siatempe mi havis tre malmulte da imagoj pri la politiko, sed ekde kiam mi scias, ke ĉiuj novaj instruoj partoprenas komence komunan sorton, — nome, ke ilin

trafas nekomprene kaj nur poste, kiam ili praviĝas, iliaj adeptoj triumfas kaj plimultigas — ekde tiam vi akuzas min pro aliĝo al pioniroj.

— Pioniroj — mansvingis rezigne Karlo. — Viaj pioniroj celas frakasi la ŝtatordon, la ekonomion, la homrilatojn kaj poste venigi la mondmiliton. Ĝis nun mi kredis, ke vi estas pacifisto. Vi, kies patro falis en la milito...

— Li falis heroe — mi ĝustigis lian kredon.

— Jen, jen, do, — murmuris mia onklo kaj medite komentis:

— Mi pensas, ke nia interparolado ne havas sencon.

[1] Éva Tófalvi (1947), diplomita filologino (pri la hungara kaj Esperanto) kaj ĵurnalistino en Budapeŝto, verkas poemojn kaj novelojn. Premiita en Belartaj Konkursoj de UEA 1978, 1979.

Oldřich Kníchal (1939), historiisto, ĵurnalista, en Budapeŝto, aŭtoro de pluraj verkoj en la ĉeĥa kaj Esp-o, tradukas en kaj el Esp-o, redaktis kelkajn Esp. periodaĵojn kaj vicon da libroj. Aperontaj estas tri liaj prozaj volumoj.



## GRATULVORTOJ POR. J. VITEK

Liajn artikolojn oni kutimis legi delonge kun la mallongigo „jelč“. Tiun mallongigon la aŭtoro ricevis foje en Skandinavio. Kiamaniere? Post la milito li prelegvojaĝis tie pri sia lando kiel sendito de la kulturministerio, kaj iu kromnomis lin tiam kun anonima intimeco kaj senpatose „Joĉjo el Ĉeĥoslovakio“, do „jelč“.

La agado de Josef Vitek, emerita instruisto, estas nedisigeble ligita kun la esperantista movado en la lastaj jardekoj. Senlaca organizanto, komitatano de la postmilita asocio en Ĉeĥoslovakio, post ĝia likvidiĝo kvin jarojn redaktanto de la praga bulteno. En 1955 prezidanto de Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista, post 1951 la unua tutlanda organo movada. En sesdekaj jaroj kunlaboranto de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. En 1969 la ĉeĥa esperantistaro starigis lin frunte al la novnaskita Ĉeĥa Esperanto-Asocio; en la prezidanteca posteno li laboris ĝis antaŭnelonge. Li plenumadis tiun taskon kun energio kaj konsekvenco por li karakterizaj kaj kun nerezistebla ĉarmo de sia personeco. Li reprezentis la ĉeĥan asocion en la internacia movado kiel komitatano de UEA.

Kaj same fervore li semas kaj rikoltas rekonon por la movado en sia proksima ĉirkaŭaĵo, kiel rekonata pedagogo. La esperantista grupo en Mělník gajnis sub lia gvido honoran titolon Esperanta rondeto de pacdefendantoj pro la kontribuo en la porvjetnama kampanjo kaj la rondestro Honor-insignon de MEM. Pro siaj elstaraj meritoj Josef Vitek estis nomita honora membro de ĈEA. Al la jubileanto okaze de lia sepdekjariĝo ni deziras en la nomo de niaj legantoj ankoraŭ multe da sukcesoj kaj elanon, pri kiu plu atestu ankaŭ la mallongigo „jelč“.

(kni)

## VASTAJ AGADEBLECOJ POR MEM

**Laŭda memormedalo de Monda Packonsilio • Kontaktoj kun UEA kaj SAT — Novaj perantoj de Paco**

Mondpaca Esperantista Movado disvastiĝas sur ĉiuj kontinentoj kaj fariĝas unu el la plej gravaj esperantistaj fakorganizoj. MEM partoprenis en la pasintjara Mondparlamento de la popoloj por la paco en Sofio per sia kvinmembra delegitaro kaj tiuokaze ricevis laŭdan memormedalon de MPK. Paralele kun la Mondparlamento okazis esperantista packunveno, kiun ĉeestis ankaŭ kelkaj estraranoj de Monda Packonsilio. Nuntempe estas preparata la nova interkonsento pri kunlaboro kun MPK.

La bazajn principojn de la agado de MEM starigis lastatempe Statuto de MEM kaj la agadprogramo, kiu estis aprobita kadre de la 64a UK en Lucerno. La agadprogramo estas la ĉefa nuntempa gvidlinio por la aktivuloj de la esperantista pacmovado.

Akorde kun tiuj ĉi dokumentoj unu el la gravaj taskoj de MEM en la hodiaŭa mondo estas vastigi kontaktojn kun aliaj esperantistaj organizoj kaj kun la naciaj pacmovadoj. Tio ebligas altigi la prestiĝon de la Internacia lingvo kaj de ties pacmovado kaj samtempe gajni la adeptojn en la neesperantista publiko. Same grava estas kunlaboro kun internaciaj organizoj Esperantaj, precipe kun UEA. Dum la pasintjara UK en Stokholmo okazis MEM-kunveno kun pli ol cent partoprenintoj, kiun rememorigis ankaŭ la kongresa rezolucio. Favore estis akceptita propono pri kunlaboro inter MEM kaj SAT. La prezidanto de MEM partoprenis la pasintjaran SAT-kongreson en Jugoslavio, kie li traktis kun la asocia prezidantaro.

Malgraŭ financaj kaj aliaj malfacilaĵoj oni plu entreprenas eldonadon de la eksterseriaj numeroj de Paco en diversaj landoj. Novaj perantoj de la gazeto estas en Aŭstralio, Aŭstrio kaj Italio. Kun tiu ĉi bilanco la aktivuloj de MEM renkontas sian 9an Ĝeneralan Konferencon. (k)

# ĈEMIZOJ POR EDZIĜA FESTO



K. J. ERBEN

1811 - 1870

*Hor' deknua pasis jam —  
Kaj en la lamp' ankoraŭ flam',  
Ankoraŭ lumas la lampet',  
Pendanta super preĝ-benket'.  
Sur mura bild' en la kaban'  
Madon' vidiĝas kun infan',  
Ŝi kiel rozo kun burĝon'  
Briletas sur ĉiela tron'*

*Kaj antaŭ la Madon-figur'  
Knabin' genuas ĉe la mur',  
Krucante brakojn, sen esper'  
La kapon klinas ŝi al ter',  
En ŝia koro — peza prem',  
Sencese ĝemon sekvas ĝem'  
Aspergas ĉiam pli kaj plu  
La blankan bruston larma flu'.*

*„La paĉjo! Min li amis plej —  
Sed jam li kuŝas en tombej';  
La panjo ankaŭ en kviet'  
Ripozas apud la patret'.  
Tro juna mortis la fratinn';  
La frato? Kuglo trafis lin...*

*Mi knabon amis kun pasi' —  
Pro li eĉ vivon riskus mi!  
Li en la mondon migris for,  
Kaj restas for ĝis nuna hor'.*

*Mi ploris antaŭ la disir',  
Sed min konsolis lia dir':  
Vi linon semu, karulin',  
Konstante rememoru min,  
Pri ŝpino zorgu en ĉi jar',  
En dua jar' pri tol-prepar'  
En tria pri ĉemizo-par' —  
Kaj tiam plektu, post la pen',  
El ruto kronon por solen'!*

*Jam pretaj kuŝas en la kest'  
Ĉemizoj por edziĝa fest',  
Forvelkas jam la ruta flor' —  
Sed la amato restas for',  
Perdiĝis li — pro voj-erar' —  
Kiel ŝtonet' en vasta mar'.  
Tri jarojn eĉ ne jam' pri li,  
Kaj ĉu li vivas, scias Di'!*

Trad. M. Lukáš

Per tiu ĉi fragmento el „Bukedo el mitoj naciaj“ ni rememorigas datrevenon de la naskiĝo de la ĉeĥa poeto K. J. Erben, konanto de la popola poezio, kaj ties majstra interpretanto.

La ĉeĥa esperantistaro rememoras ĉijare la 80an datrevenon de la fondo de la unua Esperanto-klubo sur la teritorio de la iama Aŭstrio-Hungario. Ĝia fondinto kaj la unua prezidanto estis redaktoro K. Pelant, alia fama kunfondinto estis senatano J. Hybeš.

En 1905 la klubo decidis dividi la laboron laŭ la naciecoj kaj tiel fondiĝis Klubo de Ĉeĥaj Esperantistoj; post la unua mondmilito ĝi ŝanĝis sian nomon je Esperantista Klubo en Brno, kiu pozitive kontribuis per aranĝo de la I-a kaj VI-a kongresoj de la ĉs.

## EK BRNO OKDEKJARA

esperantistoj en la moravia metropolo (1922 kaj 1935). La klubo iniciatis i. a. perradiajn prelegojn en Esp-o, kies nombro daŭre kreskis. Estis disaŭdiĝataj dramverkoj, operoj, operetoj. La plej granda danko por tiu ĉi eminenta rolo de la brna radio-stacio nomata Verda Stacio, apartenas al ties direktoro A. Slavík. Post la milito Brno okazigis multajn ekspoziciojn, prelegojn

kaj kursojn, popularigante Esp-on ekz. per sia kunlaboro kun la Internacia Foiro de Brno. La famaj en la kluba aktiveco estas la solenaj koncertvesperoj, en kiuj partoprenadas elstaraj artistoj de la urba muzika vivo. Granda kluba entrepreno estis la 8a kongreso de ĉs. esperantistoj (1950), ankaŭ la unua kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en 1969. Al multfanka agado de la klubo apartenas klerigaj, popularsciencaj prelegoj kaj kunlaboro kun diversaj Esperanto-organizoj.

(17)

Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj kaj Slovaka Akademio de Sciencoj subskribis pasintjare kvinjaran kontrakton pri kunlaboro kun Hungara Akademio de Sciencoj. Kiamaniere tiu ĉi dokumento stimulos la reciprokajn kunagadon? La demandon respondas dro János Dömény, fakestro pri la internaciaj rilatoj de Hungara Akademio de Sciencoj:

Kunlaboro inter nialandaj sciencaj institucioj komenciĝis jam antaŭ la dua mondmilito, sed pri ties laŭplana kaj celkonscia kunordigado oni rajtas paroli nur post la jaro 1945. La nuna kontrakto interkonsentita por la periodo 1981—1985 sistemigas la reciprokajn kunlaboron en 71 diversaj agad-sferoj profitante de la ĝisnunaj spertoj. Por solvado de la komunaj taskoj ĝi partoprenigos preskaŭ ĉiujn sciencajn institutojn en ambaŭ ŝtatoj. Kvankam niaj komunaj taskoj laŭkvante ne malplimultiĝis — Ĉeĥoslovakio staras en la dua loko post Sovetunio rilate nian internacian sciencajn kunlaboron — ni devis plistriktigi kaj diferencigi ilian selektaĵon.

Koncerne la ĉefajn direktojn de la kunagado ni povas konstati sukcesajn atingojn en la fizikaj-matematikaj

## ĈEĤOSLOVAKIO - HUNGARIO

### KOMUNAJ SCIENCAJ ESPLOROJ

sciencoj, kemio kaj biologio, en la esplorado de la hidrosfero kaj en racia utiligo kaj protektado de la akvo-rezervujoj.

Verŝajne la plej interesa ĉapitro estas la sociaj sciencoj. Tiurilate indas substreki meritplenan aktivigon de la komunaj komitatoj, kiu altgrade kontribuis al esplorado de la pasinteco de niaj popoloj kaj samtempe al pozitiva solvado de iuj aktualaj problemoj.

Surbaze de la planoj por la proksima kvinjara periodo la ĉeĥoslovakaj kaj


hungaraj sciencistoj ekzamenados la ĉefajn tendencojn kaj leĝojn de la ekonomia evoluo en la periodo de la progresinta socialisma socio kaj la historian evoluon de ambaŭ landoj konekse kun tiu de la mondhistorio. Ne eblas preteratenti ankaŭ sufiĉe ampleksan temaron, kiu rilatas la homan personecon en la socialisma socio, ties socialan pozicion, vivmanieron kaj edukadon.

La komunajn esplorojn oni ne povas imagi ekster la kadro de la landoj de Konsilantaro de Reciproka Ekonomia Helpo (KREH), kies scienca potencialo helpas plifirmigi ankaŭ nialandajn scienculojn. Akademioj de ambaŭ landoj kunlaboras precipe en la sfero de la bazaj esploroj, strikte ligitaj kun solvado de la respektivaj taskoj kadre de KREH kaj sur la nivelo de la interregistaraj organizoj.

La ĉeĥoslovaka, slovaka kaj hungara akademioj ankaŭ venonte kontribuos laŭ siaj eblecoj al efektivigo de la longdaŭra kompleksa programo de la KREH-landaro kaj adekvate evoluigos siajn multflankajn rilatojn kun la superaj sciencaj institucioj en la ceteraj socialismaj landoj.

(al)

Desegnaĵo Pavel Rak



EL LA LIBRO  
DE KAREL ČAPEK  
RAKONTOJ EL UNUA POŝO KAJ RAKONTOJ EL LA DUA POŝO  
KIUN ELDONIS  
ĈEĤA ESPERANTO - ASOCIO

Ĝi estis ordinara polica kazo: je la kvara matene surveturis aŭto en Žitná strato ebrian maljunulinon kaj kun maksimuma rapido forveturis. Kaj nun la juna polica praktikanto doktoro Mejzlík estis esploranta, kiu aŭto ĝi estis. Tia juna praktikanto tion prenas serioze.

„Hm,“ diris doktoro Mejzlík al policisto numero 141, „vi do vidis el distanco de tricent paŝoj rapide veturantan aŭton kaj sur la tero homan korpon. Kion vi faris unue?“

„Unue mi kuris al la vunditino,“ raportis la policisto, „por doni al ŝi la unuan helpon.“

„Unue vi estus identigonta la veturilon,“ murmuris doktoro Mejzlík, „kaj nur poste zorgi pri la maljunulinaĉo. Sed eble,“ li aldiris, gratante sin per kraĵono en la hararo, „ke ankaŭ mi farus same. Do numeron de la veturilo vi ne vidis; kaj kio alie koncernas tiun veturilon —?“

„Mi opinias,“ diris hezite la policisto numero 141, „ke ĝi estas malhela. Eble ĝi estis blua aŭ ruĝa. Tio ne estis bone videbla pro la fumo el gastubo.“

„Aĥ, Jesuo Kristo,“ lamentis doktoro Mejzlík, „kiel mi konstato, kiu veturilo ĝi estis? Ĉu kuri al ĉiuj ŝoforoj kaj demandi ilin: Mi petas ĝentile, ĉu vi ne surveturis oldan maljunulinaĉon? Nu, homo, kion mi faru kun tio?“

La policisto ŝultrolevis en subalterna senkonsilo. „Mi petas,“ li diris, „al mi anonciĝis iu atestanto, sed ankaŭ li scias nenion. Mi petas, li atendas apude.“

„Do alkonduku lin,“ diris doktoro tedite kaj vane klopodante ellegi ion el la magra protokolo. „Mi petas nomon kaj domicilon,“ li diris mekanike; la atestanton li eĉ ne rigardis.

„Králík Jan, studento de inĝenierfako pri maŝinoj,“ eldiris firme la atestanto.

„Do sinjoro, vi ĉeestis, kiam hodiaŭ matene je la kvara surveturis nekonata aŭto Božena-n Macháčková.“

„Jes, kaj mi devas diri, ke la ŝoforo estas kulpa. Mi petas, sinjoro komisaro, la strato estis tute vaka; se la ŝoforo malakcelus sur vojkruciĝo —“

„Kiel proksime vi staris?“ interrompis lin doktoro Mejzlík.

„Ĉirkaŭ dek paŝojn. Mi akompanis mian amikon el — el kafejo, kaj kiam ni estis en strato Žitná —“

„Kiu estas via amiko?“ interrompis lin denove doktoro Mejzlík. „Tion mi ne havas ĉi tie.“

„Jaroslav Nerad, poeto,“ diris la ates-

## POETO

tanto kun ioma fiero. „Sed tiu versimile dirus nenion al vi.“

„Kial ne?“ murmuris doktoro Mejzlík, kaptante ĉian superon.

„Ĉar li... estas tia poeto. Kiam okazis la malfeliĉo, li ekploris kaj kuris hejmen kiel eta infano. Kiam do ni estis en strato Žitná, veturegis de malantaŭe aŭto per freneza rapido —“

„Kiun numeron ĝi havis?“

„Tion mi ne scias, mi petas. Tion mi tute ne rimarkis. Mi rimarkis nur la frenezan veturon kaj ĵus mi diris al mi, ke —“

„Kaj kia veturilo ĝi estis?“ interrompis lin doktoro Mejzlík.

„Kvartakta eksplodmotoro,“ diris eksperte la atestanto. „En aŭtomarkoj kompreneble mi ne estas sperta.“

„Kaj kiun koloron ĝi havis? Kiu sidis en ĝi? Ĉu ĝi estis kabrioleteto aŭ limuzino?“

„Tion mi ne scias,“ diris la atestanto embarasite. „Mi opinias, ke ĝi estis ia nigra veturilo; sed pli detale mi tion ne rimarkis, ĉar kiam okazis la malfeliĉo, mi diris al Nerad: Vidu, tiuj latronoj surveturas homon kaj eĉ ne haltas!“

„Hm,“ opiniis doktoro Mejzlík malkontente, „tio ja estas tute konvena kaj ĝusta morala reago, sed mi ŝatus pli, se vi rimarkus numeron de la veturilo. Estas mirige, sinjoro, kiel la homoj ne scias observi. Vi scias ja, ke la ŝoforo kulpas, vi juĝas kompreneble ĝuste, ke tiuj homoj estas latronoj, sed la numeron vi ne rigardas. Juĝi scias ĉiu: sed funde, objektivite rimarki la aferojn — Mi dankas al vi, sinjoro Králík; mi ne detenos vin.“

Post unu horo sonorigis la policisto numero 141 ĉe la loĝejmastrino de poeto Jaroslav Nerad. Jes, sinjoro la poeto estas hejme, sed dormas. La poeto okulegis el la pordo per etaj miregantaj okuletoj je la policisto; iel li ne povis rememori, kion fakte li faris. Fine tamen li ekkomprenis, kial li iru en policejon. „Ĉu ĝi devas esti?“ li demandis malkonfide. „Nome jam nenion plu mi memoras; mi estis nokte iom —“

„Drinkinta,“ diris la policisto kompreneme. „Sinjoro, mi ekkonis multajn poetojn. Do, sinjoro, vestiĝu: ĉu mi atendu vin?“

Poste la poeto kaj la policisto komencis paroli pri noktaj lokaloj, pri la vivo entute, pri strangaj fenomenoj sur la ĉielo kaj multaj aliaj temoj; nur la politiko estis al ambaŭ fremda. Tiel en amika kaj instrua interparolo venis la poeto al la policejo.

„Vi estas sinjoro Nerad Jaroslav, poeto,“ diris al li doktoro Mejzlík. „Sinjoro atestanto, vi ĉeestis, kiam la nekonata aŭto surveturis tiun Božena Macháčková.“

„Jes,“ elspiris la poeto.

„Ĉu vi povus diri al mi, kia aŭto ĝi estis? Ĉu kabrioleteto aŭ limuzino, de kia koloro, kiu sidis en ĝi, kiun numeron ĝi havis?“

La poeto intense pripensis. „Tion mi ne scias,“ li diris, „tion mi ne rimarkis.“

„Ĉu vi rememoras iun detalon?“ insistis Mejzlík.

„Eĉ ne ete,“ diris la poeto sincere. „Sciu, entute neniam mi atentis la detalojn.“

„Mi petas vin,“ komencis doktoro Mejzlík ironie, „kion do entute vi rimarkis?“

„La tutan etoson,“ diris la poeto neprecize. „Sciu, la forlasitan straton... tian longan... dum krepusko... kaj kiel tiu ino restis tie kuŝanta —“ Subite li eksaltis. „Ja ion mi pri ĝi skribis, veninte hejmen!“ Li palpis en ĉiuj poŝoj kaj eltiris aron de kovertoj, faktu-

roj kaj de aliaj tiaj paperaĉoj. „Ne, ĉi tio ĝi ne estas,” li grumblis, „ĉi tio ankaŭ ne — Ni atendu, eble tio ĝi estas,” li opiniis absorbite observante dorsflankon de iu koverto.

„Montru tion al mi,” diris doktoro Mejzlík indulgeme.

„Ĝi estas nenio,” defendis sin la poeto. „Sed se vi volas, mi tralegos tion al vi.” Post tio entuziasme ekle-gante kaj kanteme plilongigante longajn silabojn, li recitis:

„Marŝ, de l'sombraj domoj, unu,  
du, haltu ek  
ruĝ' matena mandolinas  
kial vi knabin' vangruĝas  
aŭtos ni sage per 120 ĈP

al mondfino  
aŭ al Singapuro eble  
haltu, haltu, aŭto flugis  
nia granda amo polve kuŝas  
knabin' rompita flor'  
cigna kolo, brust', tamburo

kaj cimbaloj  
kial tiom mi ploras.”

„Jen ĉio,” deklaris Jaroslav Nerad.

„Mi petas vin,” diris doktoro Mejzlík, „kion ĝi signifas?”

„Nu ja, tio estas la malfeliĉo kun la aŭto,” ekmiris la poeto. „Ĉu ĝi ne estas komprenebla?”

„Mi pensas, ke ne,” opiniis doktoro Mejzlík kritike. „Iel mi ne povas ekoni el tio, ke la 15-an de julio je la kvara matene en Žitná strato surveturis aŭto numero tiu kaj tiu sesdekkvin-jaran ebrian almozulon Božena Ma-

„Ja ĝi estas Žitná strato,” diris la poeto trankvile. „Tiaj du domo-vicoj, jes?”

„Kaj kial ĝi ne estas eventuale Nacia avenuo?” demandis doktoro Mejzlík skeptike.

„Ĉar tiu ne estas tiel rekta,” sonis konvinka respondo.

„Do plue. Ruĝ' matena mandolinas — Nu, povas esti. Kial vi knabin' vangruĝas — Mi petas vin, de kie aperas la knabino?”

„Matenruĝo,” diris la poeto lakone. „Ha, pardonu. Aŭtos ni sage per 120 ĈP al mondfino. — Nu?”

„Versimile alveturis la aŭto,” eksplikis la poeto.

„Kaj ĉu ĝi havis 120 ĈP?”

„Tion mi ne scias; tio signifas, ke ĝi veturis rapide. Kvazaŭ ĝi volus flugis fino de la mondo.”

„Aĥ, tiel. Aŭ al Singapuro eble — Miadio, mi petas vin, kial ĝuste al Singapuro?”

La poeto ŝultrolevis. „Jam mi ne scias. Eble tial, ĉar tie estas malajoj.”

„Kaj kian rilaton havas la aŭto al malajoj? He?”

La poeto deprimita tremetis. „Eble la veturilo estis bruna, ĉu vi ne opinias? li diris mediante. „Io bruna tie certe estis. Kial alie estus tie Singapuro?”

„Do vidu,” diris doktoro Mejzlík, „tiu veturilo estis ruĝa, blua kaj bruna.


„Ha,” diris doktoro Mejzlík atente. „Kaj kio la brust'?”

„Tio ja estas 3, du arketoj, ĉu?” miris la poeto.

„Ankoraŭ vi havas tie tamburon kaj cimbalojn,” impetis la polic-oficisto streĉe.

„Tamburo kaj cimbaloj,” meditis poeto Nerad, „tamburo kaj cimbaloj... tio povus esti eble la kvino, ĉu? Rigardu,” li diris kaj skribis numeron 5. „Tiu ventreto estas kiel tamburo kaj supre cimbaloj — “

„Atendu,” diris doktoro Mejzlík kaj skribis sur papereto 235. „Ĉu vi estas



cháčková; la vunditino estis fortransportita en la ĝeneralan hospitalon, kie ŝi agonias. Ĉi tiujn faktojn via poemo, sinjoro, laŭ tio kiom mi rimarkis, ne mencias. Tiel.”

„Tio estas nur la kruda realo, sinjoro,” diris la poeto frotante sian nazon. „Sed poemo estas interna fakto. Poemo, tio estas liberaj superrealaj imagoj, kiujn la faktoj elvokas en subkonscio de poeto, ĉu? La vid-kaj aŭdo-asociadoj. Kaj al tiuj devas leganto submetiĝi,” deklaris Jaroslav Nerad mentore. „Poste oni tion komprenas.”

„Mi petas vin,” impetis doktoro Mejzlík. „Aŭ atendu, pruntedonu al mi tiun vian opuson. Dankon. Do jen ni havas, hm: Marŝ' de l'sombraj domoj, unu, du, haltu, ek. Mi petas do, klarigu al mi — “

Kion mi elektu el tio?”

„Elektu la brunan,” konsilis la poeto. „Ĝi estas agrabla koloro.”

„Nia granda amo polve kuŝas, knabin' rompita flor’”, legis doktoro Mejzlík. „Tiu rompita flor’, tio estas la ebria almozulino?”

„Mi ne skribos ja pri ebria almozulino,” diris la poeto tuŝite. „Simple ŝi estis virino, ĉu vi komprenas?”

„Ha. Kaj kio estas ĉi tio: Cigna kolo, brust', tamburo kaj cimbaloj. Tio estas libera asociado?”

„Montru,” diris la poeto embarasite kaj kliniĝis super la papero. „Cigna kolo, brust', tamburo kaj cimbaloj — kio ĝi povas esti?”

„Ĝuste je tio mi demandas,” murmuris doktoro Mejzlík lom ofende.

„Atendu,” meditis la poeto, „io tie devis esti, kio rememorigis min — Aŭdu, ĉi iam ne impresas vin duo kiel cigna kolo? Rigardu,” kaj skribis krazone 2.



certa pri tio, ke la aŭto havis numeron 235?”

„Nepre neniun numeron mi rimarkis,” deklaris Jaroslav Nerad decide. „Sed io tia devis tie esti — de kie ĝi povus aperi?” li miris, cerbumante super la poemeto. „Sed sciu, ĉi-loko estas la plej bona el la tuta poemo.”

\* \* \*

Post du tagoj vizitis doktoro Mejzlík la poeton; la poeto ĉi-foje ne dormis, sed havis tie iun knabinon kaj vane serĉis vakan seĝon, por ĝin prezenti al la polic-oficisto.

„Tuj mi kuras plu,” diris doktoro Mejzlík. „Nur mi venas diri al vi, ke vere ĝi estis veturilo numero 235.”

„Kiu veturilo?” miregis la poeto. „Cigna kolo, brust' tamburo kaj cimbaloj,” elŝutis per unu spiro doktoro Mejzlík. „Kaj Singapuro ankaŭ.”

„Ha, jam mi scias,” diris la poeto. „Vi vidas do, jen la interna fakto. Ĉu vi volas, ke mi tralegu al vi kelkajn plurajn poemojn? Nun vi komprenos ilin.”

„Nur alifoje,” rapidis diri la polic-oficisto. „Kiam denove mi havos iun kazon.”

Bildoj de Milan Labašta

LUBOMÍR FELDEK

Odo je la kapturna tempo —

*Estas do tie ĉi temp' kiun laŭdas ni  
Iras nun preter vi trote mort-procesi'*

*belaj atletoj jen ĉerkon sekvante jam  
pensas pri la vesper' ties amuz-program'*

*Nur ne l'mortinto ĉi senos je sia krur'  
Pensas fenestre vi kiu la morta nur*

*Ture la hormontril' turnas sin haste pli  
Pretas sen via sci' ĉerk' mia eĉ por vi*


*Pretas cent jarojn jam Kiom ja gravas ĝi*

El la slovaka trad. J. Kořínek

## REKONO AL ĈS. SCIENCO

Unuafoje en ĝia historio fariĝis prezidanto de Internacia Astronaŭtika Federacio (IAF) ĉeĥoslovaka sciencisto, akademiano, doc. L. Perek. La federacio, kies ĉefcelo estas „klopodi pri la evoluigo de la astronaŭtiko por la pacaj celoj“ estis fondita antaŭ tridek jaroj kaj ĝi unuigas tiu-specajn societojn el preskaŭ 40 landoj. La pasintjara kongreso de IAF, dum kiu elektiĝis la nova prezidanto, okazis en Tokio, unuafoje sur azia kontinento. Ĉeestantaj fakuloj okupiĝis ekzemple pri la programo „Interkosmos“, pri la sekurecaj problemoj en la kosma spaco, pri la eblecoj ligi kontaktojn kun la eksterteraj civilizacioj. La kongreso rekonis i. a. kreskantan rolon de Ĉeĥoslovakio en solvado de etiaj ĉi problemoj, kion cetere konfirmas ankaŭ la prestiĝa posteno konsakrita en IAF al la ĉeĥoslovaka sciencisto..

Desegnaĵo Pavel Rak



## MEZE DE EŬROPO...

Skize pri la historio de Ĉeĥoslovakio

Esperantigis E. Seemannová,  
O. Kníchal, A. Staňura

Prago 1980

## PIONIRO DE LA MATEMATIKO

Unesko omaĝas ĉijare la personecon de elstara matematikisto kaj filozofo Bernard Bolzano (1781—1848) naskiĝinta en Prago. Lia plej ampleksa verko (germanlingva) titoliĝas „Scienca doktrino“ kaj estis verkita inter 1820—1830. Bolzano grandparte sukcesis konstrui kompletan matematikan sistemon; estas pruvite, ke en multaj branĉoj tiurilataj li havas prioritaton, ekzemple kiel unua li precize prilaboris la nociojn de infinitaj grandeco kaj malgrandeco, same kiel tiun pri la limigiteco. Bedaŭrinde la manuskriptoj de Bolzano ne estis dum longa tempo eldonitaj, tiel ke la novaj esploroj en sekvaj jardekoj igis liajn atingojn malpli aktualaj.

**PACO**, ĉeĥa eldono-jaro 1981. Preparis Porpaca sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, 110 00 Praha 1. Respondeca redaktoro Zdenko Křimský. Redakta komitato: PhDr J. Jermář CSc, ing. Vl. Kočvara, Draĥ. Kočvara, ing. M. Turková. Grafika aranĝo kaj titolo-paĝa fotografajo de M. Labašta. Eldonkvanto 3.000 ekz. Preso: Presejo en Praha kunlabore kun la eldonejo PANORAMA.